

Tiom da fungoj – en Germanujo

La nombrado de fungoj en Germanujo komenciĝis per la regens-burga protestanta pastro *Jakob Christian Schaeffer* (1718-1790). En 4-voluma publikaĵo kun mankolorigitaj desegnaĵoj li listigis preskaŭ 400 speciojn trovitajn en Bavario, el kiuj ĉ. 80 estis menciataj por la unua fojo. Ankaŭ la sekva elstara germana fungoamiko estis pastro, tiufoje el Heslando: *Adalbert Rieken* (1850-1924). Li jam skribis pri 2000 specioj – t.e. preskaŭ ĉiuj tiam konataj fungoj en meza Eŭropo. De la nuntempe konataj ĉ. 100 000 fungospecioj ekzistas en Germanujo 12000 mikroskope malgrandaj kaj 6000 kun fruktokorpoj nudokule videblaj. Por bongusta vespermanĝo tamen suffiĉas malmultaj ekzempleroj de nur unu specio. (2003-09-18)

Nocio ekŝanĝeliĝas – kiel difini specion?

Klasike, al specio apartenas ĉiuj bestoj, kiuj estas komune generadkapablaj al fekundaj posteuloj. Pariĝo de malsamspeciuoj povas generi posteularon forme de hibridoj, kiuj estas nefekundaj (ekz. mulo, la ido de ĉevalino kaj azeno). Laŭ esploristoj, libere vivantaj darvinfringoj (laŭ kiuj Darvino mem konstruis sian speciokonceptaĵon) vigle pariĝas kaj produktas fekundajn miksulojn. Ankaŭ kelkaj rano-specioj perpleksigis la sciencistaron. Tutbunte seksumas ankaŭ la animaloj en zoologiaj ĝardenoj, kie jaguaro kaj leopardo, tigrino kaj leono produktas fertilan posteularon. Kaj tio, kio rangas ĉe skaraboj kiel unuopa specio, genetike malpli diferencas ol du mamuloj aŭ du birdoj de la sama specio. La nocio "specio" do forte ekŝanĝeliĝas. (2003-09-17)

Interna horloĝo – kiom fidinda estas la karbona datado?

En morta organika materialo tiktakas, kvazaŭ interna horloĝo, la dum vivotempo stokita radioaktiva karbon-izotopo ^{14}C , kiu malrapide malkomponiĝas ĝis neradioaktiva ^{12}C kaj tiel la aktualtempa izotopmiksaĵo malkaŝas al ni la aĝon de la materialo (kondiĉe ke estas konataj la elir-rilatoj). Dum esplorkzamenado de la jarringoj de antikvaj lignoj en Anatolio/Turkujo kaj ĉe *Main-rivero*/Germanujo nun evidentiĝis, ke la radiokarbonaj horloĝoj ŝajne regione malegale funkcias: la ^{14}C kvoto de la germana ligno plialtiĝis dum paso de kelkaj jarcentoj (eble pro diferencaj kreskad-fazoj) kompare kun ekz. tiu de la turka. Oni jam faris la unuan temp-indikan korektadon: la vulkaneksplosion sur insulo Santorino oni antaŭen translokiĝis je 100 jaroj – nome al 1560 a.K. (2003-10-02)

La plej malgranda ulo – inter la bestetoj

De la ĉ. 23000 konataj specioj da reptilioj, birdoj kaj mamuloj iu lacerto estas la plej malgranda. Temas pri lacerto-liliputano, kiu vivas en Karibio – malkovrita nur antaŭnelonge sur *Beata*-insulo kaj en la najbara Dominika Respubliko. La naneto portas la fieran sciencon nomon *Sphaerodactylus ariasae*. Tiu nomo estas pli longa ol la vivestaĵo mem: la mini-lacerto mezuras nur 16 milimetrojn – plenkreska kompreneble. (2003-09-26)

Ek en la sudon – kiom rapide flugas birdoj?

Kiam ni somerferiinte hejmenvenas el sudaj regionoj, tiam por la birdoj jam "ekas": ili baldaŭ flugos kun diferencaj rapidecoj en siajn dumvintrajn restadejojn – kaj ilia rapidecdiferenco estas vere miriga. La migra falko (plonĝfluge kun 320 km/h absoluta rapidec-ĉampiono!) ekzemple nur kun malimpresaj 60 km/h flugas al siaj hispanaj sunplenaj ĉasregionoj, dum la - kiel "lama" malbonfamigita - anaso survojflugas kun duobla rapideco. Ankaŭ la nizo, ĝenerale rigardata kvazaŭ "sportflugisto", kapablas flugvojaĝi nur kun 40 km/h – kaj pro tio malvenkus granddistance kontraŭ la laŭdire "plumpaj modeloj" kiel fringo (55 km/h), sturno (75 km/h) kaj kurierkolombo (90 km/h). Svelte kaj plej rapide survojas la apodo – kvazaŭ "*Porsche*" inter la birdoj. Ĝi facile flugkapablas 150 km/h – kaj tion longdistance! La maksimuma povumo dum tagdistancoj de 500 km efektivas tute senpretenda birdo: la skolopaco. (2003-09-29)

Kaŝtanoj el Hispanujo – kion bezonis la antikva romia manĝo?

Aulus Gellius, romia verkisto el la 2-a jarcento p.K. konstatis: "Por kulinara ĝuo de la manĝo la pavo devas esti el Samo (*Samos*), la kokoj el Frigo (*Phrygia*), gruo el Melo (*Melos*), kapretoj el Etolio (*Aetolia*), la tinuso el Ĥalkedono (*Chalkedon*), murenoj el Tarteso (*Tartessos*), ezokoj el Pesino (*Pessinus*), la ostroj el Tarento (*Tarentum*), nuksoj el Tarso (*Tarsus*), konkoj el Ĉinujo, daktiloj el Egipto, kaj la kaŝtanoj el Hispanujo".

Kun ĉio ni ja deklaras nian tutplenan aprobon, kaj ni vere trovas konsiderinda la oĵstrobredadon por la hodiaŭa suditala Tarento. Sed la konkoj el Ĉinujo igas nin forte cerbumadi. En kiu kondiĉo ili alvenis en la antikvan Romon? Kaj se ili alvenis – ĉu ili influis la ruiniĝan forpereon de la Romia Imperio? Ĉar – ĉu sciis la romianoj, ke konkojn oni manĝu salubre nur en monatoj **kun "r"**? Konkoj ja estas